La Riverego

Januaro 2020 (speciala eldono)| Jaro 36, No 138
Esperanto-Societo Kebekia, kunlabore kun Kanada Esperanto-Asocio
esperanto2020.ca | uea.org/kongresoj/alighilo

# Montrealo-2020 !



# Dumvintre, revu pri ekskursoj !

# Feliĉan novan jaron 2020!

La jaro de la 105-a UK ĵus komenciĝis... Ĉirkaŭ 700 homoj aliĝis ! Dankegon al ĉiuj, kiuj jam aliĝis ! Se vi ankoraŭ ne faris, aliĝu nun ! Se vi loĝas en Nordameriko, profitu la okazon sperti UK-n en Nordameriko mem ! Ĉiuj partoprenantoj ĝuos nian kulture unikan urbon.

Se vi ankoraŭ hezitas veni, pensu, ke la UK estas por ĉiuj ! Aparte se vi estas lernanto aŭ nova parolanto, pasigi semajnon en Esperantujo estas bonega maniero plibonigi vian lingvoscipovon. Jes ja, la UK estas granda evento, sed ĝuste pro tio ĝi havas interesaĵojn por ĉiuspecaj Esperantistoj : junuloj, kulturemoloj, turismemuloj (kun belegaj ekskursoj — legu la baldaŭ aperontan Duan Bultenon) kaj multe pli ! Montrealo atendas vin en 2020! :) esperanto2020.ca/eo/chefpagho/ **Via, LKK**

# Kiel aliĝi al la UK-2020 ?

1) Vizitu la retejon uea.org/kongresoj/alighilo

2) Plenigu la retan aliĝilon.

3) Pagu rekte ĉe UEA (kreditkarto, banka ĝiro, UEA-konto aŭ via landa peranto). La landa peranto por kanadanoj estas KEA — Kanada Esperanto-Asocio. Vi povas pagi al KEA per ĉeko, Interac aŭ PayPal en la retejo esperanto.ca. Ĝuu la rabaton por fruaj aliĝoj ! (Vidu la kotiztabelon sube).

Infanoj kaj gejunuloj, naskiĝintaj post la 31-a de decembro, nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj, gasto aŭ grava kontribuanto (laŭ aparta interkonsento kun la organizantoj) aliĝas senpage.

**Notu ke indas membriĝi (70 CAD) por ricevi la rabatan kotizon. Bonvenon al Montrealo!**

| KONGRES-KOTIZOJ VALIDAJ (ĉiuj en eŭroj) | ĝis 2019.12.31 1-a periodo | | ĝis 2020.03.31 2-a periodo | | ekde 2020.04.01 3-a periodo | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **Aliĝkategorio** | **A** | **B** | **A** | **B** | **A** | **B** |
| 1. individua membro de UEA (ne inkluzivas aligitajn membrojn) | 190 | 145 | 240 | 180 | 290 | 215 |
| 2. ne individua membro de UEA | 240 | 180 | 300 | 225 | 360 | 270 |
| 3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA | 95 | 70 | 120 | 90 | 145 | 110 |
| 4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA | 145 | 105 | 180 | 130 | 215 | 155 |

# UK-2020 : Stipendioj por kanadanoj!

**La LKK kuraĝigas ĉiujn interesitojn informiĝi pri haveblo de stipendioj, kiuj povus helpi partopreni en la UK-2020 en Montrealo. Ni petas ĉiujn landajn asociojn helpi al esperantistoj de siaj asocioj partopreni la UK-on 2020, laŭ siaj ebloj, kaj ni ankaŭ petas esperantistojn el la tuta mondo konsideri fari la donacojn al siaj landaj asocioj kun la celo partoprenigi loĝantojn de siaj landoj en la UK-2020 en Montrealo.**

Kanadaj esperantistoj povas peti stipendion de la komuna fonduso de Kanada Esperanto-Asocio, Esperanto-Societo Kebekia kaj LKK por UK-2020 en Montrealo. Klaku ĉi tiun ligilon por peti stipendion. Oni aljuĝos tre limigitan kvanton de la stipendoj:

1) Baza stipendio.

a) baza stipendio de 200 $ por kanada esperantisto en TEJO-aĝo (35-jaraj kaj malpli);

b) baza stipendio de 250 $ por kanada esperantisto kiu ne plu estas en TEJO-aĝo (pli ol 35-jara);

2) Vojaĝ-suplemento

a) vojaĝ-suplemento de 200 $ por kanada esperantisto loĝanta pli ol 500 km de Montrealo;

b) vojaĝ-suplemento de 400$ por kanada esperantisto loĝanta pli ol 2000 km de Montrealo ;

3) Stipendio por partopreno en Esperanto-kurseto : 50 $ por kanada esperantisto kiu partoprenos en unu el la 2-tagaj Esperanto-kursetoj antaŭ la UK (en Montrealo aŭ Kebeko).

1, 2 kaj 3 povas aldoniĝi. Ekzemple, vi povas peti unu bazan stipendion, unu vojaĝ-suplementon kaj unu subvencion por la kurseto. La limdato por la stipendipeto estas la 28-an de februaro 2020. La LKK instigas vin aliĝi al la UK frue por la plej favora kotizo. Notu ke pluraj Landaj Asocioj de UEA disponigas limigitan kvanton de stipendioj por helpi loĝantojn de siaj landoj partopreni diversajn eventojn. Kontaktu vian landan asocion por informiĝi, ĉu ĝi povas helpi al vi partopreni en la UK-2020 en Montrealo. Eble ankaŭ en 2020 UEA ofertos stipendiojn per la Fondaĵo *Partoprenu UK-on.* Bv. regule legi la gazetarajn komunikojn. uea.org/aktuale.



# ILEI-Kongreso en Kebeko : stimula kunveno kaj preludo al la UK

*Mireille Grosjean*

De la 25-a de julio ĝis la unua de aŭgusto 2020 okazos la 53-a ILEI-kongreso en Kebeko (Kebekurbo), 250 km for de Montrealo. La kongresejo kaj gastejo estas la Universitato Laval (UL), ne for de la malnova kebekia ĉefurbo. Fakto estas, ke la provinco kun la nomo Québec estas en Esperanto Kebekio, kaj la urbo Québec nomiĝas en Esperanto Kebeko. Kebeko nombras proksimume 700 000 loĝantojn, kaj Montrealo nombras 1 700 000, kaj eĉ pli, se oni konsideras la ĉirkaŭajn urbopartojn. Do temas pri du malsamaj urboj, ambaŭ vizitindaj.

Kebeko havas malnovan urboparton, iom pariz-similan, kun pavimitaj stratoj, ĝia unika etoso altiras multajn turistojn. Konsekvence esperantistoj saltante al Kanado devus malkovri tiun urbon, flari la ILEI-etoson, progresi en sia lingvokapablo dum agrabla semajno kaj tiel maturiĝi por atingi Montrealon sabate, la unuan

de aŭgusto, post 250-kilometra komuna busveturado.

La ILEI-Kongreso estu la unua plado, preludo, antaŭkongreso, inaŭguro, enkonduko, lertigejo, laŭ via plaĉo. Ĉe ILEI estas diversaj kutimoj, kiuj ĉiujare altiras multajn gekongresanojn. Unue estas la frandvespero, kie ĉiu alportas ion bongustan el sia regiono kaj prezentas ĝin tiel, ke ĉiuj kongresanoj povas migri de tablo al tablo kaj gustumi nekonatajn pladojn kaj allogajn trinkaĵojn. Lingvokursoj, lingva festivalo, pedagogia foiro, faka programo kun diversaj prelegoj, ludvespero por malkovri Amerikon, jen kelkaj planitaj programeroj. Survojas provo okazigi vendrede simpozion kune kun la profesoroj de UL, la Universitato Laval. Tio kongruos kun la kongresa temo : Interlingvistiko en universitatoj. La pritema enkonduka prelego estos prezentita de Prof. Duncan Charters, la prezidanto de UEA kaj eks-prezidanto de ILEI.


La kampuso de la Universitato Laval gastigos nin. Do ni ULumos aŭ fariĝos ULoj. Venu ulumi kun ni ! Ĉiuj detalaj informoj troviĝas ĉe www.ilei.info

*La artikolo unue aperis en revuo Esperanto (januaro 2020)*

# Montrealen : virtuale kaj reale !

***Ĵenja Amis***

Jen bela novaĵo — Esperanta mapo de Montrealo estas havebla rete ! Estas bona maniero konatiĝi kun Montrealo, la urbo, kiu gastigos la 105-an Universalan Kongreson de Esperanto (1-8-a de aŭgusto 2020). Vizitu diversajn montrealajn vidindaĵojn, la kongresejon kaj… venu persone en 2020 ! Notu ke tio ĉi ne estas la fina versio de la mapo, multaj aliaj aferoj aldoniĝos poste. La mapo estas farita en Google Maps, vi povas uzi ĝin kun aŭ sen interreta konekto en Montrealo (por uzi sen la interreta konekto vi devos elŝuti ĝin). esperanto2020.ca/eo/mapo-2020





# Pli ol la UK!

**Vi decidis veni al Montrealo, bonege ! Nu, ni invitas vin konsideri resti pli ol unu semajnon ! Ne nur ĉar unu semajno ne sufiĉas por vidi ĉion en Montrealo, kaj ĉar ni havos elstarajn antaŭkaj postkongresajn programojn – sed ankaŭ ĉar ĉirkaŭ la kongresa semajno en Montrealo okazos pluraj mondfamaj festivaloj – eventoj, kiuj portas al Montrealo plurajn milionojn da vizitantoj ĉiujare ! Notu ankaŭ la aron de diversaj Esperantaj eventoj**

## Ne-esperantaj festivaloj ĉirkaŭ la UK

### Nur por ridi

Iom antaŭ la UK – de la 15-a ĝis 26-a de julio 2020 – okazas la fama montreala festivalo *Juste pour rire* – Nur por ridi – la plej granda internacia humurfestivalo en la mondo, kiu okazas ĉiujare de 1983. Ĝi konsistas el diversaj humurspektakloj en teatroj kaj ĉiaspecaj (senpagaj) amuzaĵoj en diversaj lokoj de la urbo, aparte en la bela Latina Kvartalo – en piedira distanco de la kongresejo. (https://www.hahaha.com)

## Oŝeaga

La famega montreala muzikfestivalo Oŝeaga ekos tuj je la komenco de la UK – la 31-a de julio – la 2-a de aŭgusto 2020. Ĝi okazas ĉiujare ekde 2006 kaj alportas ĉiujare plurajn dekmilojn da (ĉefe, junaj) ŝatantoj. Se vi planis resti en junulargastejo, ni invitas vin mendi tra UEA por havi lokon, kaj mendi sufiĉe frue vian loĝadon. Ĝi okazas en la belega parko Jean-Drapeau sur la insulo Sainte-Hélène, kie siatempe troviĝis la famega Universala Ekspozicio – Expo-67 – facile atingebla per metroo. (https://www.osheaga.com)

## Festivalo pri Indiĝenaj Kulturoj

De la 4-a ĝis la 12-a de aŭgusto (do, plejparte samtempe kiel la UK), en Montrealo okazos la Festivalo pri Indiĝenaj Kulturoj de Kanado (la jubilea: 30-a eldono, kiu estos aparte riĉa). Ĝi okazos proksime de la kongresejo, do facile atingebla piede. Notu ke la 8-an de aŭgusto je la 16-a horo (do, post la fermo de la UK, en la sama tago), sekvos la fama Parado de Nacioj urbocentre kaj esperantistoj partoprenos ĝin kune kun trideko da aliaj kulturoj – se vi ŝatus ĉeesti, certiĝu ke vi estos en Montrealo la tutan tagon en sabato, kaj eble eĉ portu vian nacian kostumon! Je la 18-a horo, ni eĉ havos la okazon prezenti triminutan spektaklon en Esperanto sur granda ekstera scenejo – tute nemaltrafenda sperto! (https://www.presenceautochtone.ca)

## Fiereca semajno

Inter la 6-a kaj la 16-a de aŭgusto 2020 vi havos okazon partopreni en la plej granda kunveno pri seksa diverseco en la francparolanta mondo : la montreala Fiereco. Dum tiu periodo, prezentiĝos pli ol 200 diversaj eventoj, por ĉiuj aĝoj kaj ĉiuj gustoj : multaj spektakloj (pluraj eksteraj kaj senpagaj), prelegoj, diskutrondoj, festoj… ĝis la famega (kaj kortuŝa) Parado de la Fiereco, dimanĉon la 16-an de aŭgusto. Venu festi diversecon kaj liberecon! (https://fiertemtl.com)



## Esperantaj eventoj

Pluraj aliaj Esperanto-eventoj okazos en Kebekio ĉirkaŭ la UK ! Notu ke estos du kursoj por komencantoj kaj progresantoj, por helpi prepariĝi al la UK – unu ĉe la ILEI-kongreso en Kebeko, kaj alia ĝuste antaŭ la UK en Montrealo.


**ILEI-Kongreso.** La 53-a Kongreso de ILEI okazos en Kebeko (Kebekio, Kanado) de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2020 kun komuna veturado al la 105-a UK en Montrealo poste. Kadre de la 53-a kongreso de ILEI okazos Esperantokursoj kiel kutime. Kiel trejnado antaŭ-UK-a vi povas aliĝi por la du lastaj tagoj kaj partopreni intensajn lingvokursojn kiel studento ; vi ĝuos la ceteran programon de la kongreso. Aŭ vi aliĝu al la kompleta ILEI-kongreso. Ĉiuj informoj legeblas ĉi tie: www.ilei.info

**Internacia Infana Kongreseto.** La 49-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) okazos de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2020 en Montrealo (Kebekio, Kanado). Ĝi okazos en komforta rezidejo kun bela parko, 600 m de la kongresejo kaj la kongresa hotelo (Ŝeraton). Krom kutimajn infanojn kaj adoleskantojn, IIK akceptas ankaŭ tre junajn infanetojn kaj junulojn, kiuj aktive helpos en la IIK -programo. Ĉiutage ni kursos, ludos kaj vizitos ion en la urbo. Merkrede kun gepatroj kaj UK-anoj ni vizitos la grandan amuzparkon. Legu informojn rete en: bertosch.free.fr/iik2020 kaj retmesaĝu al infana.kongreseto@gmail.com.

**Nitobe-simpozio,** kun la temo *Lingva diverseco kaj daŭripova evoluigo*, okazos ĉe la Universitato de Montrealo (Kebekio, Kanado), ekde 14h00 en la 8-a de aŭgusto ĝis 13h00 en la 10-a de aŭgusto 2020. Pli da informoj ĉe http://esperantic.org.

**MEK, la Montreala Esperanto-Kurso,** estos speciala dutaga kurso por komencantoj kaj progresantoj, prepare al la Universala Kongreso. La kurso okazos ekde la mateno de vendredo (31-a de julio) ĝis la frua vespero de sabato (1-a de aŭgusto) ĝustatempe por partopreni la kongresan programeron por unuafojaj kongresanoj. Ĝin instruos du brilaj Esperanto-instruistoj, Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge. Jen unika okazo por vi aŭ por viaj konatoj ! La kurso estos malferma egale al aliĝintoj kaj nealiĝintoj al la Universala Kongreso. Informojn kaj aliĝilon vi trovos en la retejo de ESF : esperantic.org/en/montrealo_2020

*La artikolo unue aperis en revuo Esperanto (januaro 2020)*



# Dum la vintro revu pri ekskursoj

***Suzano Roy***

**Kanado. Brrrr... Ĉu vi pensas pri longaj, malvarmegaj noktoj, blovegoj, neĝoŝtormoj en senfinaj ebenaĵoj ? Nu, vi pravas. Tion ni atendas dum vintro. Sed ĉu vi aŭdis pri niaj someroj ? Probable ne multe, ĉar ili estas kutime agrablegaj (kvankam mallongaj) kaj oni ne multe parolas pri belaĵoj, en niaj « katastrofofrandaj » mediatoj.**

**Kebekio.** Malpli konata, eble. Sed ege malkovrinda. Jen la « mankanta ĉenero » inter Eŭropo kaj Ameriko. Ni, posteuloj de francoj, kiuj gardis la francan lingvon, sed prenis ankaŭ multe de la indiĝenaj kulturoj (kaj poste de la angloj kaj de aliaj enmigrintaj popoloj), ni sentas nin kiel verajn latin-amerikanojn. Ni estas ege vigla kaj originala popolo, gaja kaj gastama.

**Montrealo.** La festema urbo, kie ĉiam okazas io! Kie vi trovas arton, gastronomion kaj homan varmon ĉe ĉiu stratangulo. Kie la homoj estas malstreĉaj, toleremaj kaj bonvenigaj. Jen la loko, kiu estos la hejmo de la venonta UK. Via venonta vojaĝo ! Nu, se vi ne havos la ŝancon partopreni, almenaŭ revu iom kun ni, pri somertempaj ekskursoj en Nord-Ameriko.

Tiu ĉi UK estos vere aparta : multaj amerikanoj spertos tian grandskalan internacian eventon unuafoje, kaj por homoj, kiuj jam partoprenis, estos ilia unua (kaj eble lasta) nordamerika UK. Tian unikan okazon, viziti Kanadon Esperante, oni ne rajtas maltrafi !

Montrealo estas insulo kaj grava haveno. El tiu insulo, nature oni veturas laŭ la riverego, la ĉefa



Kebeko



Otavo

vojo, per kiu esploristoj eniris iam la kontinenton. Do nature, estos vojaĝoj ambaŭflanken, kun- aŭ kontraŭ-flue !

Vojaĝante nordorienten, oni malkovras la koron de la franca Kanado. Dum Montrealo estas moderna, kosmopolita urbego, Kebeko (aŭ Kebekurbo), la plej malnova urbo norde de Meksiko, havas tute alian etoson. Ĝi konservis ne nur siajn muregojn sed ankaŭ sian francan ĉarmon. En 1985, Unesko deklaris ĝian malnovan kvartalon «monda heredaĵo». Daŭrigante la vojaĝon laŭ la riverego, ni veturos ĝis Tadusako, mondfama observejo por pluraj specioj de balenoj. Survoje ni vizitos belegan regionon, Charlevoix, rendevuejon de naturo kaj artistoj ĉiuspecaj.

**Ontario.** Aliflanke, vojaĝante sudokcidenten, eblos viziti la nunan ĉefurbon, Otavon, la malnovan ĉefurbon, Kingstonon, kaj la plej grandan urbon de Kanado, Torontton. Estos perfekta okazo vidi ankaŭ la famegajn akvofalojn de Niagaro kaj boatumi, survoje, en la mirinda regiono de la 1000 insuloj.

Jes, estas multege da vidindaĵoj, kaj imagu : vi povus fari ĉiujn tiujn mirigajn vizitojn en Esperanto ! Kun ĉiu grupo vojaĝos spertaj esperantistoj, kiuj afable tradukos ĉion. Se vi venos unu semajnon antaŭ la UK kaj restos unu semajnon poste, por vidi ambaŭ flankojn de la riverego Sankta-Laŭrenco, vi havos la bonŝancon esperantumi dum tri plenaj semajnoj. Revu, revu...

Revu... kaj venu ! Por ebligi, ke kiom eble plej multe da homoj vojaĝu antaŭ kaj post la UK, ni decidis oferti (krom la normalaj, luksaj vojaĝoj, kiuj kompreneble okazos kiel kutime) malplikostajn, «junularajn» ekskursojn.

Jen tute nova afero. La ideo estas oferti vojaĝojn tre similajn al la klasikaj UEA-ekskursoj, sed kun malpli da komforto kaj malpli da inkluzivaĵoj. Fakte, estas neniu aĝolimo, sufiĉas esti juna en la koro ! Ni uzos la reton de la junularaj gastejoj, kie ĉiuj estas bonvenaj. Kanadaj junularaj gastejoj estas tre agrablaj, puraj, sekuraj kaj ĉiam ideale situantaj en urbocentroj. Ili ne estas luksaj, kompreneble. Temas pri 4- ĝis 10-personaj dormejoj, kun duetaĝaj litoj kaj dividitaj banĉambroj. Do ĉiu devas esti preta grimpi en sian liton… Ni certas, ke la plezuro estos tiom granda, malgraŭ malpli granda prezo. Nu, eble vi povas ne nur revi sed ankaŭ plani!

*La artikolo unue aperis en revuo Esperanto (januaro 2020)*

## Bela video pri Montrealo !

Vidu la kongresejon kaj diversajn montrealajn vidindaĵojn en la belega video fare de Marteno Benoit ! youtu.be/6Do4NCQvjXc




## Medalo por la UK-2020

La LKK por la 105-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo konsideras la eblon presi memormedalon de la UK. Tamen, por ke ni ne faru malprofiton, ni devas pli malpli scii antaŭe, kiom da medaloj ni kredeble povos vendi. Se vi interesiĝas pri la aĉetado de tia medalo, bv sendi mesaĝon al Garry Evans, kasisto de la LKK : garryoevans(ĉe)gmail.com. La medalo estos el polurita arĝentita bronzo, kun diametro de 38 mm. Ĝi kostos 60 kanadajn dolarojn (aŭ 45 usonajn dolarojn, aŭ 42 eŭroj) por ĉiu ekzemplero, inkluzive de luksa skatoleto, plus poŝtaj kostoj.

# Montrealo solidara :

## Helpu loĝigi esperantistojn en bezono dum la UK !

### *Zdravka Metz + LKK*

Komenciĝis la jaro 2020. Ni ŝatus bondeziri al vi ĉion bonan, sanon kaj sukceson ! Por ni, esperantistoj en Montrealo, Kebekio, Kanado, 2020 estas grava jaro, ĉar de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto estas ni, kiuj gastigas tiun gravan Esperanto-renkontiĝon, la Universalan Kongreson (UK), jam la 105-an fojon okazantan en la historio de la Esperanto-movado.

Jam aliĝis pli ol 700 personoj el pli ol 50 landoj. Jam de du jaroj la LKK (Loka Kongresa Komitato) preparas la kongreson, kiu okazos en la hotelo Sheraton, 1201, boul. René Lévesque Ouest.

Ni konas esperantistojn de multaj landoj, kaj ni scias, ke, por multaj el ili, el malpli riĉaj landoj, la kostoj eĉ en junulara gastejo estas tro grandaj. Ni ŝatus helpi al ili malfermante niajn domojn, tiel ke ilia loĝado dum tiu semajno estu senpaga.

Estas nur vi, kiu scias, ĉu vi povus ebligi modestan tranoktadon (en salono, sur helplito, en la kelo sur iu matraco) en via domo por unu aŭ kelkaj personoj, por ke ili partoprenu la UK-on en Montrealo. Registru vin ĉe [tiny.cc/gastigado2020](tiny.cc/gastigado2020)

Ni, la LKK, estos tre feliĉaj, se ni povus oferti kaj ebligi senpagan tranoktadon dum tiu semajno, por iom da personoj. Tio estus grandega helpo por esperantistoj, kiuj pretas prepari prelegetojn, laborgrupojn – unuvorte, volontuli kaj grave kontribui por la kongreso.

Bonvolu pripensi, ĉu vi povus esti gastiganto en tiu semajno kaj feliĉigi iu(j)n esperantisto(j)n. Kompreneble, eblas ankaŭ donaci al la ĝenerala kaso de la UK ([esperanto2020.ca/eo/donacu](esperanto2020.ca/eo/donacu)). Bonvolu respondi al ni frue, por ke ni komencu fari la liston de gastigantoj kaj informu la petantojn, kiuj poste bezonos prizorgi la ceteron (eventuale vizon, bileton…) kaj pretiĝi por la alveno en Montrealo.

La solidareco faras ĉiam miraklojn ! En Montrealo ni jam gastigis multegajn esperantistojn, kaj ni kredas, ke kune eblas fari tion denove ! Ĉu vi pretus helpi al ni ? Nome de tiuj feliĉuloj kaj nome de la LKK ni anticipe kaj sincere dankas al vi !

# Atendu la sekvan eron de Rivereg-er-aro baldaŭ!

## Intertempe, helpu al ni reklami la 105-an UK-on dividante tiun ĉi eldonon kun viaj amikoj : en Facebook kaj aliaj sociaj retoj, retpoŝte aŭ legante en via klubo, kaj… jes, aliĝu !

Aliĝoj : UEA | Facebook | Instagram | LKK-retejo | #Esperanto2020

Tiu ĉi estas speciala eldono de *La Riverego*, la periodaĵo de Esperanto-Societo Kebekia en kunlaboro kun *Lumo*, la periodaĵo de Kanada Esperanto-Asocio, por informi la kanadan kaj internacian publikon pri la 105-a UK-2020 en Montrealo. **Redaktado kaj grafiko :** Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado :** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. Esperanto-Societo Kebekia : esperanto.qc.ca | Kanada Esperanto-Asocio : esperanto.ca

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d’espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko :** Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce) esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado :** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK :** Nicolas Viau (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Normand Fleury (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d’espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d’espéranto.

**Rédaction et graphisme :** Yevgeniya Amis (riverego(à) esperanto.qc.ca). **Correction :** Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE :** Nicolas Viau (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller), Normand Fleury (conseiller).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2020.01.30**

**6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d’espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d’espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

***Visitez notre site web !***

www.esperanto.qc.ca




Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

**www.pasportaservo.org.**

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.